# Esperanta Vorto

MAJO 12 JUNIO

CIRKULERO DE ESPERANTO-RONDETO ĈE „OSVĚTOVÁ BESEDA“ EN LANŠKROUN

## Pro kio tiel malfrue?

Kvankam financa stato tre pliboniĝis danke al multaj niaj legantoj, ni kaj „nia“ ciklostil-maŝino ne estis kapablaj eldoni majan kaj eĉ ne junian numeron de EV. Kial? Kiam ni presis 3-an paĝon de maja numero, ni malfeliĉe difektis la ciklostilon. Erare ni esperis, ke ni mem sukcesos rebonigi ĝin. Ni devis forsendi difektitan parton al Šumperk kaj atendi. Ni atendis longe kaj ankoraŭ atendas. Sed vi eble opinius, ke la redaktoro kaj liaj helpantoj mortis, tial helpe de Loka nacia komitato en Lanškroun ni aldonis almenaŭ ĉi tiun dufolion. Ne timu, de tempo al tempo ni forigos ĉiujn malhelpojn, ni denove baldaŭ aŭdiĝos. Red.

## Esperanta somero en Ĉeĥoslovakio.

Kvankam tiu ĉi jaro ne prezentis sin ĉiam agrable, tamen lastaj tagoj montras belan someron. En homon kvazaŭ enfluas gaja spirito kaj kune espero kaj vivĝojo. Tio ĉio devigas nin al vigla laboro kaj agado ankaŭ sur kampo Esperanta.

Kamardoj, utiligu Esperanton! - Ho ve! Tutmonda kongresejo estas por ni ne atingebla same kiel nia eksterlanda amikaro. Sed konsciu, ni ne estas forlasitaj, ja ni estas Esperantistoj. Jen memorigu vin, ke multaj kluboj kaj ges-anoj ricevadas bonegan gazeton „Heroldo de Esperanto“, kvankam ne povas pagi. Ni estas tiel informataj danke al eksterlandaj Esperantistoj kaj precipe al eldonanto / Scheveningen, Nederlando /. Ankaŭ sur tiu ĉi loko ni tutkore dankas.

Dumo ni povas vijaĝi en nia patrujo. Ni vizitu verdajn kunvenejojn rekte en Ĉeĥoslovakio. Ja spite ĉion tuto nia lando verdiĝas kaj ĉi-somere Esperanto sonos tra la tuta nia patrujo. Nu, imagu:

Doksy ĉe lago de Mácha – metropolo de nordbohema banloka kaj turista vivo – jam la sepan fojon fariĝos kunvenejo de multaj ĉeĥaj kaj slovakaj gesamideanoj. Belegan medion ĉe la „Ĉeĥa maro“ kompletigas originala samideana vivo kiel en kursoj tiel dům diversaj ekskursoj kaj enterprenoj.

En Rožnov sub Radhošť, en belega loko de moravia montaro Beskydy okazos ĉi-jare denove Someraj Esperanto-Kursoj, kiuj certe ankaŭ nunjare estos tiel fruktodonaj por nia movado. Precipe nia Junularo plenigos urbeton Rožnov, ĉar meze de kursaro estos tie aranĝita Tutŝtata konferenco de Ĉeĥoslovaka Esperantista Junularo.

Ni jam estis en Bohemio, moravio kaj nun ni alvenas al Slovakio, al Poprad – montegaro AltajTatroj. Ankaŭ ĉi tie floras la movado, precipe inter junularo. Somere tie flirtos la verda standardo okaze de 14-taga Somera Kolegio de Esperanto. Diversgradaj kursoj, amuzo, ekskursojn en ĉarman ĉirkaŭaĵon – tio signifas la plej belan libertempon sw Esperantistoj.

Sed ni ankoraŭ ne estas ĉe fino. Esperantistoj, kaj speciale Junularo, havas pli ampleksan programon. En valo de Moravice, proksime de Opava, estas preparata unu specialaĵo – Esperanta lernejo en naturo – tendaro de Esp.Junularo. Ĉi tie estos klerigataj gvidantoj de junularaj rondetoj, kiuj perfektiĝos en la lingvo kaj lernos ĉion, kion ili bezonos kiel funkciuloj. En la tendaro partoprenantoj faros ĉion mem inkluzive kuiradon.

Junularo Třebíč pasos 14 tagojn en propra tendaro ĉe akvobaro de Vranov. Restado en naturo kaj riĉa programo senduba plifortigos Esp.spiriton kaj sanon de anoj de Junularo Třebíč. Sed atentu, ke neniu dronu!

Do, ni jam trairis kolegiojn kaj tendarojn, sed ni forgesis, ke Esp.Junularo Hradec ĉe Opava aranĝos en someraj monatoj ciklistan ekskurson – vojaĝtendaron. Ĝi estos longa 800-900 km kaj oni veturos el Humenné tra Slovakio kaj Moravio ĝis Hradec ĉe Opava. Karaj samideanoj, partoprenantoj de tiu akskurso, elkore mi deziras al vi favoran veteron. Neforgesu korupti sanktan Petron kaj sur biciklojn prenu verdajn flagetojn!

Ni opinias, ke ĉeĥoslovaka Esperantistaro ne povos ekdormi, eĉ ne sub varmegaj radioj de la suno. Ni agos ĉie, en resanigejoj, sur konstruaĵoj, dům laborbrigadoj ktp. Sed se vi povos, aliĝu al iu kursaro por plivigliĝi kaj refreŝiĝi. Ĉie vi ricevos 50% rabaton je fervojoj. Jen ĉefaj datoj:
ROŽNOV – 12.7. - 26.7. Adreso: Marie Skařupová, Ostrava 10, pošt.přihr. VŽKGn.p.
DOKSY - 27.7. - 9.8. Adreso: Somera Kolegio de Esperanto, Doksy u Máchova jezera.
POPRAD - 10.8. - 23.8. Adreso: Somera Kolegio de Esperanto, Poprad.
Tendaro ĉe OPAVA - 3.8. - 16.8. Adreso: Bl.Kuzníková, Rooseveltova 17, O p a v a .
Ciklista ekskurso HUMENNÉ – HRADEC U OPAVY – en julio aŭ aŭgusto.
Adreso: Míra Paruza, Hradec u Opavy 64.

# E. J. r a p o r t a s

Hradec Králové.

Nun nia grupo disvastiĝis je kelkaj knabinoj el mastruma lernejo en proksima vilaĝo Stěžery, kie ĝuste finiĝis kurso por komencantoj. Ili nun regule vizitadas niajn kunvenetojn en nombro 4 – 6 eĉ kun ilia juna instruistino. Nun ni rajtas iam antaŭvespere iradi en proksiman hotelon, kie estas por ni senpage disponebla piano. Do, ni unue intencas perfekte ellerni la junularan himnon kaj poste aliajn esperantajn kantojn . . . L.Rejthárková

Pardubice

Dum aprilo ni finis nian printempan kurson por komencantojn, kiun vizitadis 27 partoprenantojn. Okaze de la fino de kurso ni aranĝis amuzan vespereton, kiu ankaŭ finiĝis sukcese. La vespereto tre plaĉis al ĉeestantoj, precipe al neesperantistoj, kaj ni varbis novajn interesulojn por nia lingvo. Nun ni perfektiĝas ĉiam antsaŭ la ĉefa kunveno / merkrede /. Ni povas diri, ke nia vivo plifortiĝas, ĉar nuna vizitado de la kunvenoj estas 15-20 geanoj, plejparte junaj. Dum ĉiu kunveno estas diverstema prelego. - Ni okazigas komunajn ekskursojn en ĉirkaŭaĵon de nia urbo . . .
Karel Franc

Ni volas aranĝi la 1-an de junio amikan kunveneton en Heřmanův Městec kun ges-anoj el tiu urbo kaj el Chrudim . . . K.F.

Rychnov n/Kněžnou

Junularo en Rychnov estas vere vigla. La 3lan de majo ĝi aranĝis belan vesperon en Popola domo. Post programo serioza kaj amuza ludis juna orkestro „Kulihrášci“. Partoprenis multaj ges-anoj el orienta Bohemio kaj eĉ el Praha kaj Moravio. Dimanĉe estis malfermita E.ekspozicio de Junularo Praha en nova klubejo sur ĉefa placo kaj krome la gastoj vizitis galerion kaj muzeon en loka kastelo. En nomo de partoprenantoj mi gratulas kaj sincere dankas al Junularo Rychnov. Rimarko: Aĝo de Junularo ne estas limigita, ja ĉiuj povas aparteni al Junularo, kiuj volas senti sin iom pli junaj. Mi ĝojis, kiam mi vidis en Rychnov modelan kunlaboron de ĉiuj. J.W.

E n p e n s i ĝ u je tasko de raportoj!

. . . Hodiaŭ jam ne interesas nin nombro de teatraj prezentadoj kaj filmoj, kiujn Rondeto koektive ekvidis, sed hodiaŭ interesas nin kiel ĉiu Junularo utiligas scion de Esperanto, kiom da homoj gajnis por Esperanto kaj lernigis ĝin al ili dům tempo de sia daŭro kaj precipe kiel tiuj samideanoj laboras. Plu ni interesiĝas pri gvid-metodo en kursoj, kunvenoj, informado pri Esperanto kaj kunlaboro de grupoj kun amas-organizaĵoj. Skribi pri tiuj aferoj al la cirkulero ne estas nur devo de delegito, sed povo de kiu ajn alia. Ja ju pli da legantoj kaj precipe korespondantoj havos la cirkulero, des pli bone plenumos sian taskon: Gvidi, instrui kaj transdoni akiritajn spertojn al ceteraj grupoj. Vl.Vyhlídka

Ne koleru je redaktoro, se li iam ne publikigas ĉian en via raporto. Enpensiĝu je tasko de la cirkulero kaj vi bone komprenos taskon de raportoj. Skribu ĉiuj kaj pri kio ajn utila por la ceteraj. Devo de delegitoj estas raporti ĝis la 10-a ĉiumonate!

- o – O – o -

Sudbohemia junulara konferenco.

La 17-an kaj 18-an de majo okazis en České Budějovice regiona junulara konferenco. Sabate ĉeestintoj vizitis Český Krumlov, vespere okazis en ejo de uzina klubo la amuza vespero kun danco, kaj programo de Junularo České Budějovice. La duan tagon je la 9-a horo matene estis malfermita laborkonferenco. Ĉeestis ĝin delegitoj el naŭ junularaj grupoj / Hradec Králové, České Budějovice, Pardubice, Dolní Čermná, Třebíč, Strakonice, Most, Lanžhot, Praha / kaj gastoj.

La konferencon malfermis s-ano Krajíc, en nomo de EAČSR parolis s-ano R.Hromada. S-ano Inĝ.Krajíc parolis pri rilatoj inter junularaj grupoj kaj Esperantistaj kluboj. Li demandis, ĉu estas bone krei la junularajn grupojn ĉe la kluboj aŭ ne, kaj tuj respondis: „Jes, estas bone. . „ Nia movado bezonas junularon. Gejunuloj havas aliajn interesojn kaj sian propran manieron de amuzo. Tial necesas, ke ili kunvenu aparte. Sed ili devas ankaŭ vizitadi la klubajn kunvenjn. Pleaĝaj s-ano devas gvidi ilin, helpi al ili, kontroli ilian laboron kaj prepari ilin por estonta poresperanta laboro.
- Tria parolanto, ĉefdelegito de Junularo, s-ano Vl.Vyhlídka, diris kelkajn novaĵojn el Esp.junulara movado. - Post paroladoj sekvis raportoj de la delegitoj kaj la diskutado. Per kanto de Esperantista Junularo la kunveno finiĝis.

Nova Esperanto – monumento.

En granda ĉeĥoslovaka industria urbo OSTRAVA okazis la 11-an de majo granda Esp.solenaĵo. En Rotter-parko estis inaŭgurita nova Esperanto-monumento okaze de 360-jara datreveno de naskiĝo de Jan Amos Komenský. - Samtempe okazis en Ostrava regiona kunveno de Esp. kaj Esperanto-ekspozicio.

Kelkaj memorigoj al partoprenantoj de la E. tendaro ĉe Opava.

Tábora se mohou zúčastnit všichni členové Junular od 15 let, a to chlapci i děvčata. Ubytování děvčat bylo zajištěno v blízké chatě. Hoši budou ubytováni ve stanovém táboře. Vstupem do tábora se všichni musí podřídit táborovému řádu a případně přestupky bude trestat táborová rada, kterou si na začátku zvolíme ze svého středu. Finanční podmínky: Jelikož vydatná strava bude 5x denně /větší část potravin bude nutno opatřit z volného trhu / bude taxa na 14-denní pobyt v táboře asi 800 – 1000 Kčs. Potravinové lístky na 14 dní odevzdá každý účastník při vstupu do tábora.

50% slevu na dráze obdrží všichni účastníci, kteří se přihlásí do 12. července.
10. srpna bude svolána krajská pracovní schůze Junulara, jíž se mohou zúčastnit delegáti skupin i z jiných krajů a podají-li přihlášku předem, zajistíme jim rovněž 50% slevu na dráhu. O nocleh pro účastníky krajské schůze bude postaráno. Bližší podrobnosti Vám sdělíme až dojdou Vaše přihlášky.

Přihlášky s podepsaným prohlášením pošlete na připojeném formuláři na adresu: Blažena Kuzníková, Opava, Rooseveltova 17.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Novaj junularoj grupoj en Orientbohemio:

NOVÉ MĚSTO n/Metují: Antonín Kodýtek, nové Město n/Metují – Krčín
NÁCHOD: Jaroslav Novák, Zbečník 297, Hronov.

Samideanino Julie Šupichová skribas:

. . . ĝoje surprizis min la 11-a numero de via bela cirkulero „Esperanta Vorto". Mi ne povas prisilenti tion, ke via „gazetato" estas vere leginda, riĉa laŭ enhavo kaj ideo – ne sole por la junularo, sed ankaŭ por ĉiu verdstelulo. Bonan laboran vi faras! Viaj fervoro kaj energio multe helpos vastigi nian paceman ligilon, kiun ni jam delonge proponas al la surda kaj blinda mondo. Daŭrigu! . . „

De Hungara Esperanto-Packomitato:

. . . Ni bzonas diversan propagand-materialon, ĉeĥoslovakajn afiŝojn, precipe kolorajn kun paca tempo, pri konstruado, movado, 1-a de majo ktp. - kune mallongan proskribon, por ke ni povu uzi ilin por ekspozicio. Adreso: K-do P.Balkány, BUDAPEST 54, p.a.M.Nemzeti Bank, H U N G A R I O

Esperanta ekspozicio

En Asniéres / Francie / estos aranĝita Esp.ekspozicio. Sendu Esperantaĵojn, afiŝojn, prospektojn ktp. al: S-ano P.Bitaudeau, 16, Avenue Pinel, ASNIERES / Seine /, Francio.

Librolisto de Orientbohema Esperanta Biblioteko.

Ĝi aperis en aprilo kaj estis tuj dissendita al ĉiuj junularaj grupoj en regiono. Estas ankoraŭ disponebla por ĉiuj en redakcio! KOREKTO: Se vi deziras pruntepreni librojn de Esp.Klubo Hradec Králové, skribu al: L.Rejthárková, ul. Karla IV. 381, Hradec Králové. / En librolisto estas malnova adreso /.

Kore ni dankas al niaj subtenantoj:

Josef Ročeň – Libice n/Doubravou, J.Lužný – Kojetín, R.Skalický – Ostrava-Vítkovice, Jos. Feiser – Pzeň, Jan Molnár – Praha, Esperant Koro – Brno, J.Marečková – Holič, Jan Tichoň – Bojkovice, A.Čambál – Martin, J.Pastor – Litvínov, Jar.Paclt – Jablonné v Podj., R.Zanáška – Kopřivnice, L.Staroň – Harichovce, František Hába – Vizovice, Svaz esperantistů ČSR – Praha, Ing.B.Molnár – Praha, Vl.Vyhlídka – Čákovice u Prahy, Esp.Junularo – Písek / L.Křivánek /, Fran.Svačina – Lanžhot, Prof.J.Filip – Přibyslav, L.Rejthárková – Hradec Králové, Karel Franc – Pardubice.

m m
m PROGRAMO DE JUNULARA KONFERENCO EN ROŽNOV pod Radhoštěm. m
mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

La 20-an de julio 1952

| | |
|---|---|
| 1. Malfermo | 14.00 |
| 2. Himno de demokrata junularo | |
| 3. Aprobo de konferenca programo kaj agada regularo | |
| 4. Elekto de konferenca sekretario | |
| 5. Elekto de labor-estraro | |
| 6. Tralego de la protokolo de pasinta kunveno | 15.00 |
| 7. Raporto de junulara komitato | 15.00 |
| 8. Raportado de la grupoj kaj diskutado | 17.20 |
| P a u z o - r e f r e ŝ i ĝ o - 10 min. | |
| 9. Kultur-programero kaj proklamo de plej viglaj grupoj | 17.30 |
| kaj plej bela cirkulero | 18.30 |
| 10. Junulara ĉefdelegito – elekto de komitato | 18.30 |
| 11. Raporto de la konferenca sekretario kaj decido | |
| 12. Valorigo de la konferenco kaj malfermo per himno | |

DELEGITOJ !!   Preparu la koncizan raporton / kvinminutan /
Pri laboro de via grupo, kiun vi tralegos en Rožnov pod Radhoštěm okaze de junulara laborkonferenco.

---

Senpaga kaj laŭbezona informilo de Junularo Lanškroun – Ĉeĥoslov.
Redakcio: Jan Werner, Gottwaldova 65, Lanškroun, Ĉeĥoslovakio.